

**DUM LI BENIS ILIN, LI ESTIS SUPRENPORTATA EN LA ĈIELON –
Komento al Evangelio de P. Alberto Maggi OSM**

Evangelio laŭ Luko 24, 46-53

En tiu tempo diris Jesuo al siaj disĉiploj: „Estas skribite, ke la Mesio devos morti, sed la trian tagon Li devas leviĝi el la mortintoj. Laŭ lia ordono nun devas esti predikata al ĉiuj popoloj invito al konvertiĝo por ricevi pardonon de la pekoj, Vi estos atestantoj pri tio, komencante de Jerusalemo. Pro tio Mi sendos sur vin la Sanktan Spiriton promesitan de mia Patro. Sed vi restu en Jerusalemo, ĝis vi estos plenigataj de lia spirita forto.”

Poste Li kondukis ilin al la vilaĝo Betania. Tie, levante siajn manojn sur ĉiujn, Li benis ilin. Kaj tiel benante, Li disiĝis de ili kaj estis suprenlevita en la ĉielon. Liaj disĉiploj adorkliniĝis. Poste ili revenis al Jerusalemo kun granda ĝojo. Kaj konstante ili gloris kaj dankis Dion en la templo.

Por kompreni la liturgian feston de la Ĉieliro oni devas referenci al tieepoka kulturo, al kosmologio, kiel estis sentata la rilato inter la ĉielo kaj la tero. Dio malproksimis de la homoj kaj estis en la ĉielo, kaj la homoj, evidente, estis sur la tero. Pro tio ĉio kio venis de Dio malsupreniris de la supro, malsupreniris de la ĉielo, dum ĉio kio iris al Dio supreniris al la ĉielo.

Tio gravas por kompreni tiun ĉi pecon, en kiu la evangeliisto, per la Ĉieliro de Jesuo, ne volas indiki al ni disiĝon de Jesuo disde la homoj, sed eĉ

pli intensan kuniĝon. Per la Ĉieliro Jesuo ne malproksimiĝas de la mondo, sed pli proksimiĝas; la lia ne estas foresto, sed eĉ pli intensa ĉeesto.

Sed ni ekzameni la pecon kiun la eklezio elektis por tiu ĉi festo. Temas pri la fina peco de la evangelio de Luko, ĉapitro 24, versikloj 46-53, sed ni ekas de la 45-a ĉar ĝi gravas. Ĝi estas la premiso kiun la evangeliisto donas al ni kaj indikas al ni por ke ni komprenu tion kion li skribas.

Fakte Luko skribas: *Tiam li malfermis al ili la mensojn por kompreni la Skribojn*. Por kompreni la skribojn ne sufiĉas ilin legi, necesas ke la menso estu malfermita, tio estas necesas malfermiĝi al novo. Tiu kiu referencas al skemoj, modeloj kaj formuloj de la pasinteco kaj ne malfermas la menson por kompreni la novon, povas legi la Skribojn, sed ne povas ilin kompreni.

Kaj Jesuo diris al ili: *“Estas skribite, ke la Mesio devos morti, sed la trian tagon Li devas leviĝi el la mortintoj.”* Jesuo konfirmas ke la Mesio, la sendito de Dio, estos suferinta kaj estos releviĝinta porĉiame – numero tri, ni ja scias ke ĝi indikas tion kio estas definitiva.

Kaj jen la mandato kiun Jesuo donas al siaj disĉiploj kaj al la ĉiutempaj kredantoj. *“Laŭ lia ordono”* en la nomo de tiu Jesuo la savanto, *“nun devas esti predikata al ĉiuj popoloj”*, la vorto utiligata de la evangeliisto indikas ĉiujn paganajn naciojn, la mesaĝo de Jesuo do ne estas rezervita por unu popolo, sed sin adresas al la tuta homaro ĉar ĝi estas la realigo de la amoplano de Dio por lia kreitaĵo.

“Nun devas esti predikata al ĉiuj popoloj invito al konvertiĝo”, nome mensa ŝanĝiĝo kiu necesigas kondutŝanĝon. La konvertiĝo en la evangelio havas tiun ĉi signifon: se ĝis nun vi vivis por vi mem, nun orientu vian vivon por la bono de la aliaj.

“La konvertiĝo por ricevi pardonon de pekoj”. La radikala ŝanĝo en la propra konduto, tiel ke la homo ne plu pensu pri si sed pensu pri la aliaj, ne plu pensu pri siaj bezonoj, sed pri la alies bezonoj, tio implicas la forstrekon de la pezo de la pekoj kiuj pezas sur viaj ŝultroj.

Kaj Jesuo aldonas: *“komencante de Jerusalemo.”* Tio kion Jesuo estas asertanta, estas sensacia, ĉar estis en Jerusalemo, en la templo, pere de oferoj kaj de ritoj ke oni koncedis la pardonon de la pekoj. Kun Jesuo la rolo de la templo estas konkludita, estas finita. La pardonon de la pekoj oni ne plu havas dum iu rito, sed dum la vivo, ne per oferoj, sed orientante propran vivon al la bono de la aliaj.

Kaj Jesuo diras "Vi estos atestantoj komencante de Jerusalemo", la sidejo de la religia institucio, en kies templo oni konsentis pri pardono de la pekoj en la nomo de Dio.

Jen la novaĵo, la malfermo kiun Jesuo proklamas kaj kiun liaj disĉiploj devas konigi al la tuta mondo. Kaj poste Jesuo anoncas: "*Mi sendos sur vin la Sanktan Spiriton promesitan de mia Patro. Sed vi restu en Jerusalemo, ĝis vi estos plenigataj de lia spirita forto.*" Jesuo anoncas la alvenon de la Sankta Spirito, kaj tiun spiriton Luko koincidigas ĝuste kun la tago en kiu la juda komunumo festadas la donacon de la Leĝaro donita de Dio al Moseo sur monto Sinajo, la tagon de Pentekosto.

En mondo en kiu la juda komunumo celebris kaj dankis pro la leĝo, sur la komunumon malsupreniras la Spirito, la amo de Dio. Tio estas la nova orientiĝo de la komunumo, la rilato kun Dio ekde nun estos alia. La kredanto, kun Jesuo, ne plu estos tiu kiu obeas al Dio respektante lian Leĝon, sed tiu kiu similas al la Patro praktikante amon similan al la lia, ne plu la leĝon do, sed amrilaton.

Poste Li kondukis ilin... la verbo estas la sama de la Eliro, devas do komenci tiun liberigon de tiu institucio *al la vilaĝo Betania. Tie, levante siajn manojn sur ĉiujn, Li benis ilin.* Tiu detalo gravas ĉar ĝi referencas al la libro de la Eliro, al la epizodo de iu milito, kiam Moseo levis la manojn, la Izraelidoj venkis, temas do pri venko-signo, ne temas do pri malvenko, sed pri venkosigno...

Li disiĝis de ili kaj estis suprenlevita en la ĉielon. Kiel ni diris dekomence la evangeliisto utiligas kulturan siaepokan lingvaĵon, en kiu Dio estis en la alto, pro kio ĉio kio iras al Dio supreniras. La evangeliisto volas diri ke en Jesuo manifestiĝas la pleneco de la dia kondiĉo. Tiu homo kiun la religiaj aŭtoritatoj kondamnis kiel blasfemanton kaj kiun ili submetis al puno rezervita al malbenataj de Dio, reale estis Dio.

Kiu blasfemis ne estis Jesuo, sed la religia institucio kiu, pro propra avantaĝo, lin mortigis. La konkludo de la evangelio de Luko estas tre seniluziiga. Fakte li skribas: *Liaj disĉiploj adorkliniĝis. Poste ili revenis al Jerusalemo kun granda ĝojo. Kaj - fina surprizo - konstante ili gloris kaj dankis Dion en la templo.*

La evangeliisto celas diri ke ili komprenis absolute nenion. La templo, la loko kiu por Jesuo estas tiu de plej granda danĝero, la loko kiun Jesuo priskribis kiel kovejon de ŝtelistoj kaj kiu estos detruita, por la disĉiploj estas la loko de plej granda sekureco. Necesos la malsuprenveno de la Sankta

Spirito, la potenco de Dio por elirigi ilin de la templo kaj ilin sendi al la homaro, al ĉiuj paganaj popoloj, kiel Jesuo estis petinta de ili.